AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado

Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno XV, Fünfhausgasse 16, Austrio. — Telefono R 33-3-64

8a jaro | AUGUSTO 1953 | n-ro 8

VI a AŬSTRIA ESPERANTO-KONGRESO

Klagenfurt

22. - 24.VII. 1953

Grupo de kongresanoj

(En la unua vico de maldekstre apud la afergvidanto s-ano Cech urbestro Peter Graf, estro de la landa registaro Ferdinand Wedenig, ministro e.s.Dr.Hans Frenzel kaj redaktoro Hans Jakob - Genève)

La kongresa prezidantaro

(de maldekstre: prezidanto emer. lernejdirektoro Leonhard Schmid, vicprezidanto lernejdirektoro Franz Watzinger, sekretario Karl Dürrschmid kaj loĝejreferanto Otto Müller)

N i a "VI-a" - p l e n s u k c e s a !

Dank' la fervoraj preparlaboroj de la L.K.K. (s-anoj dir.Schmid, dir.Watzinger, Karl Dürrschmid, Otto Müller, Fr.Casar, A.Ramschak kaj P.Pio Lenz) estis la "VI-a Aŭstria Esperanto-Kongreso", okazinta en la tagoj de la 22-a ĝis 24-a de Julio en Klagenfurt plena sukceso.

Honarata de la ĉefaj landaj kaj lokaj politikaj kaj ekleziaj aŭtoritatuloj kaj favorata de bela, sunbrila vetero nia "VI-a" restos ĉiama bona rememoraĵo por la multnombraj en- kaj eksterlandaj partoprenantoj. Pli ol 18o gesanoj el ĉiuj aŭstriaj liglandoj aliĝis kaj la ega plej multo ankaŭ ĝin partoprenuis. Plue ni povis ankaŭ saluti pli ol 60 gastojn el 10 landoj, kiuj, traveturante la karintian ĉefurbon al la "38-a" en Zagreb-Jugoslavio pasigis kun ni aŭstriaj ges-anoj la kongrestagojn. Laste ni povis ankaŭ saluti travojaĝantan norvegan kongres-karavanon, kiu kun la forvojagintaj s-anoj pasigis la lastan kongres-vesperon.

La unuan kongres-tagon ĉ-aŭ 15o geparteprenantoj sub gvido de la komitatestro s-ano Schmid rigardis la muzeon kaj la vidindaĵojn de la urbo Klagenfurt kaj posttagmeze faris motorboatan rondvojaĝon sur la lago de Wörth, vizitante ankaŭ la belan banlokon Velden. La vesperan Inter-Kon-vesperon ĉeestis pli ol 200 samideanoj, kiuj ĉe diskreta muziko kaj Esperantoj-kantoj ĝis preskaŭ meznokto sin amuziĝis.

La dua kongresa tago komencis per katolika Di-servo. La edifoplenan predikon faris s-ano pastro Pio Lenz; la kantoj de la Schubert meso estis Esperant-lingve kantetaj. Je la 10-a horo okazis en la impona aŭlo de la moderna "dro Karl-Renner-lernejo" la solena kongresa kunsido. Ĉeestis prekaŭ 300 personoj. Post enkonduka muzikaĵo, salutis la estro de la L.K.K., s-ano emerit. lernejdirektoro Leonhard Schmid, la multnombrajn honorgastojn kaj la gekongresanojn. La kongreson malfermis s-o Wedenig, la estro de la karintia liglanda registraro, kiu nome de la lando Karintio bonvenigis la ĉeestantajn en- kaj eksterlandajn Esperantistojn. Nome de la gastur-bo transdonis la urbestro s-o Graf la salutojn de la loĝantaro kaj de la urbestraro, esprimante la ĝojon, ke la plej suda aŭstria liglanda ĉefurbo estis elektita por festi la ĉi-jaran ĉefan Esperanto-manifestacion. Li sciigis, ke la urbestraro en kunsido de 15-a de Majo decidis nomigi konstruotan straton en nova urb-kvartalo "Esperanto-strato". Ĉi ti sciigo, kiel tiu pri la eldono de nova Esppoŝtmarko en la jaro 1954, ricevita de la ĝeneraldirekcio de la aŭstria poŝtadministacio, estis kun grandaj

aplaŭdoj akceptataj. La salutojn de la loka episkopo, eminenco dro Köstner transdonis s-o ĝeneral-vikario dro Kadras, kiu, kvankam malnov-filologo vidas en Esperanto gravan kaj necesan nuntempan ilon de interkompreniĝo, emfazante, ke en la nuna tempo ĉiuj lokaj distancoj estis per la invento de aviadiloj, radio kaj televido preskaŭ forigitaj. En la nomo de la Esperantista ĉeforganizo salutis s-ano Hans Jakob, estrarano de UEA, instigante la samideanojn de Aŭstrio, kiu en la sekvonta agadjaro festos la 50-jar-jubileon de sia movado al speciala fervora aktiveco. Nome de S.A.T. salutis s-ano Richter, por I.K.U.E. s-ano Mudrak. Por la mondfederalista U.L. salutis s-ino Maasbrummel. Servis salutaj alparoloj de la reprezentantoj de la eksterlandaj ges-anoj; por Aŭstralio, s-anino Samblebe, por la Jugoslava kongres-lando s-ano dro Jovanovic, kaj tiuj de Germanio, Svisio, Anglio, Svedio, Italio, Nederlando. La finnlanda gasto nur sekvontage nin alparolis. La salut-alparoladojn finis s-ano kort.kons. Steiner, nome de la estraro de la Intern.Esp-Muzeo en Wien.

La kongresan festparolon faris s-ano emer.ministro dro Frenzel, la prezidanto de la "Aŭstria Esperantista Federacio", skizante la evoluon de nia movado, ĝian celadon kaj atentigante pri ĝia nepra neceso. La alparoloj, kaj de la honor-gastoj kaj de la samideanoj, estis ĉiam aŭ en Esperanto, aŭ en la germana lingvo de s-ano Cech tradukitaj. Post la decido transsendi al nia ŝtatestro s-o federacia prezidanto dro Körner, al la federacia kanceliero Ing. Raab, al la instruministro, s-o dro Kolb, al la A.E.F.-honorprezidanto ĝeneralpoŝtdirektoro dro Dworschak, al s-o episkopo dro Köstener kaj al la urbestro de Vieno, s-ano Franz Jonas salutadresojn, estis de laŭtlegataj de la multaj salutleteroj. Per kanto de la karintia kaj Esperanto-himnoj finis la solena kunsido.

Posttagmeze okazis ekskurso al la elfosaĵejo sur la Magdalens-monto, kie oni povis primiri la postrestaĵojn de la praa kelta-romana kulturo kaj al la pitoreska, mezepoka kastelo Hochosterwitz. Karintia folklora vespero finis la belan tagon.

La tria kongres-tago estis dediĉita al la ĝeneral-kunveno de la Aŭstria Esperantista Federacio. Posttagmeze kunvenis granda nombro de la kongresanoj en la ĉefa-stacidomo por adiaŭi la al la " 38-a " forvoĝantojn gesamideanojn. Al s-ano Ramschak estis sukcesinta akiri por la pli ol 80 veturantoj specialan vagonon. Finante la koncizan kongres-raporton estu menciataj ankaŭ la multaj, ofte malfacilaj, klopodoj de la loĝeja referanto s-ano Otto Müller.

Al ĉiuj kongres-komitatanoj, speciale al la s-anoj dir. Schmid kaj al la kongresa sekretario Dürrschmid estu por iliaj klopodoj kaj penadoj, esprimata danku de ĉiuj kongrespartoprenintoj. Ni ankaŭ danku al la autoritatuloj, al la landa registraro, la instrua ministerio kaj al la urbestraro pro la subvenciado de la kongreso kaj al aŭstria postadministado por la senkosta disponigo de speciala kongresa poŝtŝtampo. R.C.

LA A.E.F. ĜENERALKUNVENO 1953.

La 24-an de Julio okazis en la festsalono de la klagenfurta Kolping-domo, post kunsido de la AEF-landestroj, prezidata de la AEF-afergvidanta estro s-ano Cech, la ĉi-jara Ĝeneral-kunveno de AEF.

Ĉeestis reprezentantoj de ĉiuj landestraroj kaj de 23 Austriaj E-societoj kaj de 7 fakgrupoj. Malfermis ĝin per salutaj vortoj kaj dankesprimo al la kongres-aranĝantoj nia longjara AEF-prezidanto, s-ano emer. feder.ministro dro, inĝ. F r e n z e l. La prezentita tagordo estis sendiskute akceptita. Pro la jam posttagmeze okazonta forveturo de granda parto de la reprezentantoj de la aŭstria E-societoj al Zagreb estis proponita konciza raportato kaj konciza traktado de la multaj gravaj punktoj de la tagordo. Pro ĉi-kaŭzo retiris s-ano dro Halbedl, la AEF-landestro de Stirio, plurajn gravajn proponojn,kiuj estos traktotaj de la nova fede - racia estraro. Kun sincera bedaŭro notis la kunvenintoj, ke nia s-ano prezidanto, pro gravaj deĵoraj kaŭzoj devas rezigni la pluan prezidantecon; li promesis tamen ĉiel akceli la agadon de la Federacio kaj la aŭstrian E-movadon. Al la eksiĝinta prezidanto, esprimis s-ano

vicprezidanto dro Grimme, la dankon de la aŭstria samideanaro, akceptante lian promeson de plua kunlaboro.

La agadraporton faris s-ano afergvid.Cech; la ĉefaj menciitaj okazaĵoj estis la translokiĝo de la AEF -Centro, la regula, monata eldonado de la AERevuo, la konstantaj klopodoj de interkontaktigo kun la landestraroj kaj aktivaj societ-estraroj, la solena inaŭguro de la "Zamenhof-monumento" en Wörgl, la aktivado de la A. E.-Instituto, la fiksigo de la stacidomaj informtabuloj, kiujn sekvos baldaŭ tiaj en la poŝtoficejoj, la okazigo de pluraj liglandaj E-tagoj, la regulaj ŝtataj E-ekzamenoj, la eldono de la "Aŭstria Antologio". Li ankaŭ diskonigis la nomojn de la en la pasita agadperiodo mortintaj samcelanoj kaj fine esprimis la deziron, ke estonte la societestraroj pli aktivigu sian agadon.

La kontentiga kasoraporto estis prezentita de nia longjara kasistino s-anino Maria Loibel, al kiu pro ŝia akurata gvidado de la kasoaferoj estis esprimita speciala danko.

La raportojn de la liglandoj prezentis por Burgenlando s-ano Rainer, anstataŭante s-anon prof.Bauer; por Karintio s-ano Dürrschmid; por Malsupra Aŭstria s-ano Joh.Schwarz; por Supra Aŭstrio s-ano Hollinger; por Stirio, en tre detala formo, s-ano dro Halbedl ; aldonajn sciigojn faris s-ano landestrara sekretario Eder. Por Salzburg, speciale pri la agado de la tiea katolgrupo Estonto, parolis s-ano Reiter. Por Tirolo raportis s-ano Hans Steiner, la iniciatinto de la Zamenhofa monumento. Laste parolis por Vorarlberg s-ano Seiwald. El tiu ĉi raportoj, same el la raportoj pri la agadoj de la diversaj fakgrupoj, kiel la fervojista (s-ano Geroldinger), junula (s-ano Schalk), instruista (s-ano Cech) katolika (s-ano Mudrak), naturamika (s-ano Braun), poŝtista (s-ano Janecka) kaj la socialista (s-ano dro Grimme) ni informiĝis pri la multa etlaboro de la aŭstria samideanaro en la nuna, al kulturaj celadoj ankoraŭ malfavora, tempo. Pri la agado de la U.E.A. en Aŭstrio detale raportis s-ano ĉefdelegito Mag.Höfert kaj la de s-anino Feichtinger verkita raporto pri la Austria E-Instituto" estis laŭtlegata.

S-ano vicprezidanto dro Grimme, kiu daŭrige prezidis la ĝ.-k. esprimis al la kunlaborantoj en ĉiuj aŭstriaj lokoj la dankon por ilia aktiveco. La raporto de la kontrol-komitato, prezentita de s-anino Zajicek, estis unuanime akceptitaj la kasistino kaj la ĝisnuna federacia estraro senŝarĝitaj.

Novelekto: Nome de la elekt-proponkomitato prezentis s-ano Eder-Graz jenan novan AEF-estraron: prezidanto - direkt.Paul GLÜXMANN - Wien; afergvid. estro - ofickons. Raimund CECH; honorprezidantoj - ĝeneral-poŝtdirektoro dro Karl DWORSCHAK kaj ministro e.s.dro inĝ. Hans FRENZEL; sekretario - Alfred BERDAN, kasistino s-ino Maria LOIBEL; en la AEF-konsilantaro kaj -estraro estis elektitaj la ges-anoj : prof. Hans Bauer - Eisenstadt, K.Dürrschmid - Klagenfurt, J.Eder - Graz,minist.kons.dro Führing, senata kons.dro Grimme, dro A.Halbedl - Knittelfeld,prof.dro P.Hohenwarte - Klagenfurt,mag.F.Höfert, dro A.Karner-Stams, H.Kraus, Jolante Leser, G.Lobel, W.Mudrak, K.Nigl-Linz, R.Novacek, F. Patak, H.Reiter-Salzburg,A.Seiwald-Bregenz,H.Schalk, J. Schwarz-Felixdorf, M.Stöckl-Innsbruck, H.Steiner-Wörgl , E.Vokal kaj E.Werner. En la kontrol-komitaton estis elektitaj la ges-anoj F.Ebner-Klosterneuburg, F.Jeitler kaj Maria Zajicek.

Kotizoj: La AEF-prezidantaro proponis moderan plialtigon de la kotizo ekde Julio 1953 al S 2.- po monate; la kotizo enkludas la asocian anecon de ĉiu AEF-ano al la U.E.A. kaj la pli ampleksigon de la AERevuo al mimimume 12 paĝoj. Aldon-(Anschluß-) membroj kaj familianoj pagas la samon, sed sen la AERevuo, por du monatoj; Post detala diskuto kaj post apelo al la societ-repre - zentantoj, klarigi al la anoj la neceson de la plialtogo estis la nova kotizo akceptata. La societoj,respekt. grupoj kaj landestraroj decidu pri propra aldona kotizo.

Proponoj: La diversaj proponoj transdonitaj al la ĝeneral-kunveno estos traktataj de la nova AEF-estraro. S-ano dro Grimme sugestis, ke prò la 5o-jar-jubileo de la aŭstria E-Movado ni, spite la farita decido, en 1954 aranĝu Aŭstrian E-Kongreson.

Pri la federacia agado en la jubilea jaro referis s-ano Cech, alvokante la liglandajn AEF-estrarojn, la societojn kaj grupojn al pli intensiva aktiveco kaj al

pli regula interkontaktigo kun la AEF-estraro. La societoj kaj la aktivuloj estas petataj per ofta alsendo de koncizaj agadraportoj por la A.E.Revuo diskonigi sian agadon al la aŭstria kaj internacia samideanaro.

La novelektita prezidanto, s-ano dir.Glüxmann finis la ĝeneral-kunvenon per rea alvoko al forta aktiveco en la jubilea agadjaro kaj per refoja danko al la aranĝantoj de la ĉi-jara kongreso, kies sukceso kaj harmonia finiĝo estu po ili rekompenco de iliaj multaj ĉirilataj klopodoj. Same la dankis al la ŝtataj, landaj, lokaj kaj ekleziaj aŭtoritatuloj, kiuj per financaj rimedoj kaj per ĉeesto al la festkunveno dokumentis siajn intereson kaj rekonon por nia lingvo kaj nia movado.

(Laŭ protokol-notoj de s-ano G.Loibel)

38a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO-ZAGREB: 25.7. - 1.8.1953

Aliĝis pli ol 1.800 ges-anoj el 37 landoj,inter ili estis 1.100 eksterlandanoj. La kutima interkona vespero okazis en la salonaro de la hotelo Esplanade, sabate la 25-an de Julio vespere.

La malferma kunsido kunvenigis pli ol 2.000 peronojn en la bele ornamitafoireja halo.Ĝin inauguris s-ano dro BAKARIĆ, la kroata ŝtatestro en Esperant-lingva alparolo. La festparolon faris s-ano univ.prof.dro PRIVAT. Parolis ankaŭ reprezentantoj de 9 registaroj.Nome de la aŭstria registaro salutis la kongreson s-o ĝeneralkonsulo dro Krumhaar. Por la aŭstria Esperantistaro kaj A.E.F. salutis nia hon. prezidanto, s-ano emer.ministro dro Frenzel. Samtage estis ankaŭ malfermita la Somera Universitato. Nia s-ano dro SIRK prezidis la instruan sekcion de la kongreso.

Grandioza estis ankaŭ la akcepto de la kongresanaro ĉe la urbestro HOLJEVAC, prezidanto de la popola konsilantaro de Zagreb. Pluraj labor- kaj fakkunsidoj, prelegoj,kongresa balo kaj ekskurso al la fama lagoj de Plitvica estis okaziĝintaj.

Ĉe la ferma kunsido laŭtlegis la kongres-prezidanto, s-ano dro BOROVECKI jenan, aplaŭde akceptitan, rezolucion: "La 38a Univ.Kongr. de Esp. apelacias al la naciaj kaj internaciaj oficialaj instancoj serioze konsideri la praktikan valoron de Esperanto kiel internacia komprenilo. Kun kontento ni registris la intereson pri Esp-o de UNESCO, kiu al Zagreba kongreso sendis observanton. Ni atendas, ke la konŭernaj aŭtoritatoj en la diversaj membro ŝtatoj de UNESCO plej detale kaj sen antaŭjugo esploru la jam atingitajn rezultojn kaj laeblecojn de la lingvo, kaj ke ili faru al UNESCO konkretajn proponojn por la utiligo de ĉi tiu plej valora kaj praktika solvo de la monda lingvo-problemo."

- - - - - - - -

La kongreso ankaŭ decidis, ke la sekvonta, 39-a Universala kongreso de Esperanto okazu en Haarlem-Nederlando.

S.A.T.-KONGRESO 1953

Pri la en Sheffield - Anglio okazinta ĉi-jara S.A.T.-Kongreso ni raportos en la sekvonta n-ro de nia A.E.R.

24-a INTERNACIA KONGRESO DE I.K.U.E. - Lourdes : 12-a - 16-a Aug.1953

La aŭstrian katolikan Esperantistaron Reprezentas la gesamideanoj MUDRAK kaj raportos pri ĝi en la Oktobra n-ro de nia organo.

A Ŭ S T R I A A N T O L O G I O

Ĵus aperis ĉe Tramondo la unua columo de la "Aŭstria Antologio".

La volumo ampleksas 64 paĝojn en formato kaj presmaniero de nia Revuo. La eksteraĵo kaj preso estas tre

komplezaj. El la enhavo ni nomas krom "Historia Enkonduko" de nia s-ano d-ro Görlich, peomojn kaj prozaĵojn de Paula Preradovic, Ferdinand Raimund, Franz Grillparzer, Nikolaus Lenau, Hermann Gilm, Maria Ebner-Eschenbach kaj Josef Weinheber en tradukoj de niaj gesamideanoj Siedl, Feichtinger, Zwach, Werner, Welemínsky kaj Sirk. Speciale menciataj estu la tradukoj el "Nibelunga kanto", "Sub la tilio" (Walther von der Vogelweide) kaj "Hanibalo kaj Scipiono" (Franz Grillparzer) de nia s-ano prof. Hainschegg.

La libreto estas havebla ĉe Tramondo kaj ĉiuj AEF-grupoj je la prezo de S 7.--. (por eksterlando 4 respondkuponoj).

N E K R O L O G O

La 25-an de julio mortis en Innsbruck nia tirola Esp.-nestoro, nia kara samideano J o s e f B a u e r en aĝo de 83 jaroj.

Tagojn antaŭe li ankorai en plena freŝeco partoprenis la "VIan A.E.Kongreson" en Klagenfurt. Ni ĉiuj ĝojis nian meritplenan, ĉiam aktivan s-anon, kasiston de la Innsbruck Esp.Klubo ĉe la plej diversaj kongres-aranĝojn saluti. Lia subita elmondiĝo estas forta sorto-bato por niaj fervoraj Innsbruckaj gesamideanoj; ni al ili kaj al la familio de nia kara, nelacigebla amiko direktas niajn sincerajn kondolencesprimojn. En ĉiama danko ni honore memoros nian fervoŕulon.

La 1lan de aŭgusto mortis nia konata samideanino Elisabeth Frey, longjara membro de la societo "Danubio" en la aĝo de nur 40 jaroj. Ni sincere kondolencas al ŝiaj patrino kaj filineto.

EKSTERLANDAJ SAMIDEANOJ EN VIENO.

Fine de Majo vizitis danlanda Esp.-karavano nian urbon. Ĝi estis prezentita al nia urbestro s-ano Fr.JONAS, kiu la partoprenantojn en la ruĝa salono de la urbdomo akceptis. En Julio alvenis Vienon s-anino Samblebe el Melbourne-Aŭstralio kaj s-ano HansJakob, estrarano de U.E.A. La 4-an de Aŭgusto alvenis sveda vojaĝgrupo nian urbon kaj estis ankaŭ de nia s-ano urbestro akceptita.

IX-a Kongreso de la Tutmonda Junular-Organizo en Wörgl

En la tagoj de la 3-a ĝis 10-a de Aŭgusto okazis en Wörgl, la pro la unua austria Zamenhof-monumento konata tirola urbo la unuan fojon en nia lando internacia kongreso de junaj Esperantistoj.

Alvenis pli ol 100 gesamideanoj el 9 landoj por priparoli en la bela regiono de la Kaiser-montaro siajn organizajn aferojn. La kongresa komitato (hon.prez. s-ano Hofrat Steiner, prezid. s-ano Hans Steiner, s-anino Brugler, reprezentantino de la T.E.J.O-prezidanto kaj s-ino Therese Keiner-Wörgl) prezentis al la gastoj alogan kongres-propramon, komencanta, lunde la 3-an de Aug. kun interkona vespero. La duan tagon kunvenis la kongresanoj antaŭ la Zamenhof-monumento, kie s-anino Brugler en la nomo de la T.E.J.O-estraro metis belan florkronon. S-anino fakinstruistino Haselsteiner el Wörgl kaj ŝia lernejana kantistaro kantis "himnon al Zamenhof"; poste recitis la juna Hansi Steiner alterne kun f-ineto Elfi Mes - ser la Zamenhofan poemom "Al la Esperantisto". Per la kantado de la "ligo-kanto" kaj de la himno finis la so - lena ĵo, kiu ankau estis de la radio-stacio Innsbruck kun intervjuoj kun la Kongresestraro kaj kun ges-anoj Brugler, Samblebe (Aŭstralio) kaj Cuené (Maroko) dissendata.

Dum al kongreso okazis ankaŭ T.E.J.O.-ĝeneralkun - veno, pluraj laborkunsidoj, ekskursoj al Kufstein, la Kaiser-montar kaj al Innsbruck (Hafelekar), plue diversaj junular-konkursoj, katolika diservo kun prediko de vikario Kaps-Salzburg, Tirola folklora vespero, aranĝita de s-anino Haselsteiner kaj internacia balo.

La kongreso de niaj junaj samcelanoj estis plensukcesa kaj kontentigis plene la alvenintojn. La festkunvenon ĉeestis ĉ-aŭ 150 personoj, inter ili ankaŭ la junular-referanto de la tirolo landa registaro, s-ano Schulrat Brunner, la loka lernejestro s-o Schulrat Ascher; la urbestron reprezentis la urbkonsilanto s-o Zangerl, ankaŭ ĉeestis la poŝtejestro s-o Wolf kaj la filino de la mortinta urbestro, komerca konsilanto Pichler, la akcelanto de la monumenta komitato.

La aŭstria poŝtadministarcio honoris la kongreson per disponigo de plaĉa, speciala poŝt-ŝtampo.

Vbb.
(Zl. 3216/47)

Esperanto-Societo Unueco Graz. Adreso: Ĉion akceptas la estro Josef **E D E** R, Graz-St. Veit, Stattegg-Eichberg 72.

Poŝtĉekkonto n-ro 49742. Esperanto-Verein Einigkeit Graz.

Ĉiusemajnaj kunvenoj kaj konversacioj: ĉiun vendredon ekde la 19.30-a en la Steiermärkische Weinstube, GRAZ, Stainzerhofgasse.

La dana, sveda kaj norvega karavanoj sur la vojo al, resp. de la 38. UK. en Zagreb restadis kelkajn horojn en Graz. Ili estis kore akceptataj de multaj membroj, kvankam la eminentuloj jam feriis en diversaj lokoj de Aŭstrio, au partoprenis la Austrian E.-Kongreson en Klagenfurt kaj la 38. Universalan en Zagreb.

En mia kolekto de la iama "Tagblatt Bibliothek" mankas la libretoj:
Zamenhof's Esperanto Reden kaj
Märchen ferner Völker,
Esperanto-Deutsch.
Kiu povas vendi ilin estas petata skribi al mi pk menciante la prezon.
Schmid Gustav. Wiener Neustadt
Wöllersdorferstrasse 25-2-6, N.Ö.

Eigentümer und Herausgeber: Österr. Esperantistenverband
Verlag: " Tramondo ". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche **W i e n** XV., Fünfhausgasse Nummer 16
Druck: Offset Vervielfältigung. ADRESSEN-SUPPAN Wien IV., Brucknerstr. 2, U 41-2-7o, U 49-5o5